N-ro 173 somero 2022 ISSN-1565 3315

# ISRAELA ESPERANTISTO

Organo de Esperanto-Ligo en Israelo
האספרנטיסט הישראלי - ביטאון האגודה לאספרנטו

## EN CENTRO DE LA MONDA ATENTO

# UKRAINIO



ISRAELA ESPERANTISTO № 173 2022

REVUO DE ESPERANTO - LIGO EN ISRAELO (ELI)

*La redaktoro*
*Mikaelo Lineckij*
*mikaelo@esperanto.org.il*

*La redakta komitato:*
*Gabi Zeevi (Israelo)*
*Andreo Peĉonkin (Rusio)*

*ELI-Prezidanto*
*Jehoŝua Tilleman*

*La redakcia poŝta adreso: P.O.K. 22041, 61220 Tel-Avivo*

## *Karaj legantoj!*



**Pro** la situacio, kiun vidas preskaŭ tuta mondo; **pro** tio, ke oni jam konsideras invadon de Rusio en Ukrainion kiel komencon de la Tria Mondmilito; **pro** tio, ke post fino de la Dua Mondmilito, post 77 jaroj la mondo denove spertas ion similan... Mi certas, ke grava plimulto de niaj legantoj esperas pri laŭeble baldaŭa kaj justa fino de la milito, kiu fakte komenciĝis februare de 2014, kiam estis aneksita Krimeo kaj okupita orienta parto de Ukrainio. La milito estis lanĉita laŭ iniciato de gvidanto de Rusia Federacio kontraŭ suverena lando Ukrainio... **Pro** tio granda parto de nia revueto estas dediĉita al ĉi tiu temo. Se iu havas ĉi teman opinion - reeĥu...

**<u>La retejo:</u>**
http://esperanto.org.il/ie.html
**<u>La enpaĝigo:</u>**
*Mikaelo Lineckij*
***<u>Abontarifo eksterlanda:</u>***
10 eŭroj. Eblas pagi per UEA al la konto elia-q aŭ mendi ĉe Libroservo de UEA.

***<u>RIPETO</u>***. Eblas ricevi plenkoloran version de la revuo al sendita de vi elektronika poŝtadreso kaj tia abono kostos por vi nur 5 €! Via elektronika poŝtadreso atendatas. Kelkaj niaj abonantoj jam uzas tiun servon.


**La enhavo:**

La ĉeftemo en la mondo - Ukrainio *M.Lineckij* ..... 3
Deklaro de ELI ..... 5
Deklaro de TEJO ..... 6
Deklaro de UEA ..... 7
Deklaro se SAT ..... 8
Deklaro de JEA ..... 9
Deklaro de 5 rusiaj esperantistoj ..... 10
Reago de REU-prezidanto ..... 11
Likvido de Ukrainio ne bonvenas en Pollando ..... 12
Memorvespero pri Lidia Zamenhof *A.Wandel* ..... 13
Mirinda Danio *traduko de M.Lineckij* ..... 15
Israela Kongreso - 22 *A.Wandel* ..... 18
Israela Kongreso - 22 *G.Handzlik* ..... 19

Nekrologoj ........................................................................................ 22
LITSUPO ........................................................................................ 24

## ĈEFTEMO EN LA MONDO - UKRAINIO…

Mikaelo LINECKIJ



Kiel eksukrainiano, mi certe tre volus, ke nomo de mia naskiĝlando sonu en absolute alia kunteksto - tute ne ligita al la militagoj. Sed tion, bedaŭrinde, jam ne eblas ŝanĝi - en teritorio de Ukrainio ekde frua mateno de 24.02.22 okazas vera plenaga kaj terura milito…

Ukrainianoj (Ukrainio estas multnacia lando, en kiu loĝas ne nur ukrainoj) neniam petis, ke iu venu kaj defendu ilin de iuj aŭ de io. Propaganda maŝino de Rusio dum almenaŭ lastaj 20 jaroj senĉese konvinkigis/as rusianojn, ke en Ukrainio regas faŝistaj naziistoj kaj ukrainianoj ĝemas sub ties jugo kaj ili sonĝas, ke venu fratoj-rusianoj por defendi/liberigi ilin. Memkompreneble, se dum longa periodo en cerbojn de rusianoj pere de ĉefaj federaciaj TV-kanaloj estis/as verŝata tiu absurdaĵo, ili komencas kredi tion. Bedaŭrinda fakto – eĉ iuj rusiaj esperantistoj kredas tion (la konkretan fakton vi povos legi iom pli poste). Rusiaj gvidantoj nomas tiun invadon "speciala milita operacio" kaj, se iu rusiano kuraĝus nomi tion "milito", tiu riskas trafi en prizonon por ĝis 15 jaroj - tio estas fakto. Tuta mondo, ekde la unua tago de la invado, eksplodis per indigniga kondamno de la milito. Registaroj de multegaj landoj postulas de Rusio tujan ĉesigon de la milito. Sed Rusio, fakte gvidata de la diktatoro, daŭre rolas surdulon.

Ukrainio estas ne la unua lando, kiun "feliĉigis" gvidantoj de tiu lando per la "helpzorgo". En tiu listo de la "helpitaj" landoj estas: Afganio (pri tio certe kulpas USSR, sed ĝuste Rusio tie ĉefrolis), Moldavio, Kartvelio, Abĥazio, Osetio, Iĉkerio (Ĉeĉenio), Sirio kaj nun - Ukrainio. Probable prepariĝu Moldavio… Ne hazarde ankoraŭ en la XIX-a jarcento oni konsideris Rusion kiel "ĝendarmo de Eŭropo".

Dum kelkaj monatoj Rusio akumulis ĉe la landlimo de Ukrainio siajn militfortojn. Laŭ kalkuloj de usona satelito - ĝis 200 miloj da soldatoj. Sed eĉ la 23-an de februaro neniu kredis, ke Rusio kuraĝos lanĉi veran militon - estis forta opinio, ke Putin simple timigas, "ludas per la muskoloj"… Sed venis la 24-a, kaj je 4:50 matene multaj ukrainiaj urboj estis skuitaj de bomb– kaj misileksplodoj. Fakte jam ĉiuj scias,

ke la milito estas lanĉita laŭ iniciato de la diktatora maniulo, kiu metas antaŭ si tute neplenumeblan taskon - ajnmaniere aligi al sia lando la najbaran landon, penante kloni forpasintan en 1991-a jaro USSR-n. Ukrainio antaŭ preskaŭ 31 jaroj (24.08.1991) anoncis sian suverenecon kaj sendependecon kaj tio estas agnoskita de la tuta mondo. En la jaro 1994 Rusio subskribis Budapeŝtan Memorandon, en kiu temis pri fordono far Ukrainio de atomarmiloj, situantaj sur ties teritorio, garantiante netuŝeblon de ukrainiaj landlimoj, tamen preskaŭ nenion, subskribitan de tiu lando (same kiel aliajn dokumentojn) ĝi strikte sekvas. Tio, bedaŭrinde, estas jam historia tradicio.



Ĉi foje Putin havis planon plene konkeri Ukrainion dum 3-4 tagoj - verŝajne li estis plene misinformita flanke de sia ĉirkaŭo, pri stato de ukrainia armeo, pri spirito, kiu regas en la popolo... Oni prognozis, ke post Ukrainio, en la plano estis invadi ankaŭ aliajn eŭropajn landojn, kiuj ne "plaĉis" al tiu, kiel li konsideras sin, kvazaŭ mondreganto. Sed Ukrainio, per sia heroa rezisto fakte baris Eŭropon de tiu barbara invado. Kaj Ukrainio riveligis faktan staton de tiel nomata "la dua armeo en la mondo".

En tiuj teritorioj, kiujn ĝi sukcesis okupi, ĝi montris sin kiel bando da murdistoj de civilaj homoj, kiel marodistoj kaj perfortuloj. Verŝajne multaj el vi, niaj legantoj, spektis inter la novaĵoj, kion faris tiuj aĉuloj en apudkijivaj urbetoj Buĉa, Borodjanka, Gostomel, Irpin', en Mariupol... Pro konduto de la okupantoj aperis nova nocio - raŝistoj, kiu signifas agresulojn eĉ pli aĉajn ol faŝistoj. Ili estis mirigitaj pro viditaj en la urbetoj lumigitajn stratojn, pro la asfalto sur la vojoj... Evidentiĝis, ke multaj el ili neniam vidis necesejan seĝon kaj bankuvon en la loĝejoj - tute necivilizitaj estaĵoj (mi ne povas nomi ilin homoj). Tiuj komfortaĵoj kaŭzus grandan koleron de ili. Oni aŭdis eĉ frazon - vi ne rajtas havi pli bonajn viv-kondiĉojn ol ni...

Kiam estas verkita ĉi tiu artikolo, estas informo pri pli ol 265 pereintaj ukrainiaj infanoj kaj pli ol 475 vunditaj... Teruraĵo... Kaj jen estas perdoj de la okupantoj ekde komenco de la milito: pli ol 32500 da soldatoj kaj oficiroj, 212 militaviadiloj, 172 helikopteroj, 1239 tankoj, senpilotaj aviadiloj - 418, flugilhavaj raketoj - 98, ŝipoj - 13 (inter ili la ĉefkrozŝipo "Moskvo") kaj multe da aliaj militteknikaĵoj... La listo ĉiutage grandiĝas... Pro kio??? Kial?? Kiucele??? En la XXI-a jarcento...

**Multaj sociaj organizaĵoj aktive subtenas batalon de ukrainia popolo kontraŭ la invado. Ankaŭ esperantistaj unuiĝoj plejparte konvene reagis al la situacio. Jen kiel reagis ELI - Esperanto-ligo de Israelo:**

## ELI bedaŭras kaj kondamnas la invadon de Rusio en Ukrainion

Laŭ sia heredo, kaj historie kaj kulture, Israelo estas forte ligita kaj al Ukrainio kaj al Rusio. Multaj israelanoj, kiel novaj kaj malnovaj enmigrintoj, havas familianojn en ambaŭ landoj. Tial la tre bedaŭrinda milito en Ukrainio tuŝas kaj malfeliĉigas multajn el ni persone. Aldone al daŭra provizo de humanitara helpo al Ukrainio, Israelo oficiale ludas specialan rolon de peranto, klopodanta ĉesigi la militon kiel eble plej rapide. Israelo jam akceptis 2500 ne-judajn rifuĝintojn de Ukrainio, krom judoj kiujn Israelo laŭ sia konstitucio akceptos senlime, eventuale dekmilojn.

En la Esperanto-asocio de Israelo, multaj aktivaj membroj estas ukraindevenaj aŭ rusdevenaj, tamen nuntempe kiel israelanoj ili pace kaj frate kunagas en la asocio promociante Esperanton laŭ la spirito de esperantismo. Sekve interhoma frateco estas tre bone konata al ni en la praktiko.

Ni konstatas ke ju pli daŭras la milito, des pli kruelaj estas la krimoj faritaj kontraŭ lokaj civilanoj. Tiel ankaŭ ni vokas al ĉesigo de la milito kiel eble plej rapide.

Ni bone konas la teruraĵojn de milito kaj la suferadon de civitano, ĉar bedaŭrinde la vivo en milito estas deproksime konata al ni laŭlonge de nia historio. La daŭra malfacila strebado por paco estas integra parto de nia nacia identenco ekde la komenco de nia sendependiĝo, kaj eĉ pli frue. Ĉiuj kiuj travivis militon, ĝin kondamnas kaj strebas al paco.

Agante en la spirito de la Esperanto ni vokas al paco tutmonde. Ni scias ke estas grandega defio agi humane dum milito, sed en milito ĉiuj malvenkas kaj en paco ĉiuj venkas. Ni tre esperas ke la popoloj ja trovos vojojn kunvivi kaj kunlabori por paco kaj pli bona estonteco por ĉiuj.



*NDLR jes... sed... "ne serĉu pacon kun tiu, kiu venis murdi vin..." Golda Meir*

### Reago de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo

## Deklaro de TEJO pri Solidareco kun Ukrainio

Sojle de nova milito, L. L. Zamenhof skribis en 1914: ***Sed memoru, memoru, memoru, ke la sola rimedo, por atingi [konstantan] pacon, estas: forigi unu fojon por ĉiam la ĉefan kaŭzon de la militoj... la regadon de unuj gentoj super aliaj gentoj.*** (*Post la Granda Milito:* PVZ Originalaro III, 2692)

Samspirite, kiel organizo dediĉita al libereco kaj al respekto de homaj rajtoj, TEJO kondamnas la invadon de Ukrainio iniciatitan de la registaro de Rusio. TEJO strebas al solidareco kaj estimo inter la popoloj, kaj pledas, por ke homoj, kie ajn en la mondo, ne suferu militon kaj ĝiajn efikojn, kiuj dividas la homaron. La milita agado fare de la registaro de Rusio kontraŭas niajn idealojn pri demokratio, tutmonda paco kaj interkompreniĝo; ĝi estas danĝera malrespekto de la fundamentaj homaj rajtoj. Tial ni decidis ne silenti pri ĝi.

TEJO solidarecas kun ĉiuj viktimoj de militoj: kun mortigitoj kaj vunditoj kaj kun ĉiuj rifuĝintoj. Al ĉiuj niaj membroj, aktivuloj, partneroj kaj samideanoj en Ukrainio ni dissendas nian subtenon. Ni agnoskas ankaŭ la suferon de rusianoj, kiuj estis kontraŭvole enplektitaj en la militon. Ni solidarecas kun la kuraĝaj rusianoj, kiuj manifestacias kontraŭ ĝi riskante malliberiĝon. Ni salutas tiujn pacajn batalantojn kiel parolantoj de lingvo de paco. Ni petas al niaj samideanoj en la tuta mondo, kaj aparte en Ukrainio kaj Rusio, interkomprememe kaj gefrate dialogi por flegi pacajn rilatojn inter la homoj, malgraŭ la kondamninda ago de la registaro de Rusio.

TEJO alvokas por paco en Ukrainio kaj tra la mondo, por ke homoj povu vivi sen risko de perforto, morto aŭ subpremo. Ni pledas por la tuja retiriĝo de la militistaro de Rusio el Ukrainio kaj por la respekto de la homaj rajtoj. Ni alvokas al ĉiuj internaciaj instancoj strebi utiligi diplomation por ĉesigi konfliktojn, provizi savan helpon al la viktimoj kaj konstrui stabilan mondan pacon. Tio baziĝu sur la respekto de ĉies homaj rajtoj, inkluzive de lingvaj rajtoj de etnaj malplimultoj. Ni apelacias al ĉiu esperantisto tra la tuta mondo: subtenu la homajn rajtojn, pacon kaj interkompreniĝon.

*Por konkrete subteni esperantistojn trafitajn de la milito, vi povas donaci al* Konto Espero *de UEA. Nun TEJO estas aktive enplektita*

*en transnacia laborgrupo de la Forumo Junulara Eŭropa (FoJE). La laborgrupo celas kunigi informojn inter Ukrainio kaj eŭropuniaj najbaraj landoj por efike disponigi bezonatajn rimedojn. Se vi povas helpi aŭ deziras kontribui al la agado de TEJO, kontaktu la Oficejon de TEJO aŭ la Komisionon pri Eksteraj Rilatoj (KER).*

*Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO)*
*la 27-an de Februaro 2022*

**DEKLAROJ de UEA**

UEA aperigis du Gazetarajn Komunikojn pri la milito: https://uea.org/aktuale/komunikoj/2022/%E2%80%9CNi-ne-cxesu-labori-por-paco-inter-homoj-kaj-nacioj%E2%80%9D-alvoko-de-UEA-al-la-esperantistoj-kaj-la-mondo (27.2) kaj https://uea.org/aktuale/komunikoj/2022/Helpo-servo-de-UEA-kaj-TEJO-responde-al-la-milito-en-Ukrainio (5.3).

Kiel kunverkinto de la deklaroj de UEA kaj ELI mi konsentas ke la unua deklaro de UEA estas iom nebula, sed tion oni povas kompreni en la senco de la statuta neŭtraleco de UEA, kiel ankaŭ respondeco pri la leĝa stato de la membroj kaj Landa Asocio de UEA en Rusio. Oni kritikis ke ili ne estas sufiĉe konkretaj kaj ne kondamnas la militon (kompare ekzemple al la deklaro de TEJO kiu aperis samtage). Ekzemple, la unua deklaro, kiu eĉ ne mencias la nomojn de Rusio kaj Ukrainio), komenciĝas per la alineo "Reage al la militaj tondroj kaj homa sufero en la oriento de Eŭropo UEA deklaras: En la historio de la homaro homoj strebis al la idealo de paco, sed neniam sufiĉe por certigi ĝian finan atingon. Tamen precize nun niaj modernaj komunikiloj havas la potencon unuigi la tutan mondon por individue kaj kolektive kriprotesti uzadon de perforto kontraŭ senkulpaj kunhomoj, niaj gefratoj. La memoro en kaj ekster Eŭropo pri du teruraj mondmilitoj kun milionoj da mortintoj bilde kaj vorte transdoniĝis kaj gravuriĝis en la konscio de ĉiuj nunaj generacioj."

La dua deklaro temas ĉefe pri la "Helpo-Servo" starigita por helpi al la rifuĝintoj. Tamen ĝia komenca alineo jam estas pli konkreta: "Pasintsemajne la mondo en ŝoko atestis la ekeston de milito pro invado en Ukrainion iniciatita de la registaro de Rusio. En malmulte da tagoj la homaro suferis jam multajn mortojn de senkulpaj homoj - interalie infanoj kaj virinoj - kaj pli ol miliono estis forpelitaj el siaj loĝlokoj. Konfirmante siajn deklarojn pri solidareco al ĉiuj, kiuj suferas pro la plago de milito, UEA, subtene de ILEI, kaj nia junulara

sekcio TEJO unuiĝis por starigo de helpo-servo responde al tiuj kondamnataj militaj agresoj..." (*redaktita de Amri Wandel)*



Strat-arta bildo "Renesanco" sur muro de domo ĉe unu el plej belaj stratoj

## Deklaro de SAT kontraŭ la milito en Ukrainio.

La plenumkomitato de SAT, kaj la organiza komitato de la 95-a SAT-kongreso, kiu devis okazi ĉi-jare en Moskvo, diskonigis komunan deklaron pro la milito en Ukrainio.

La Organiza Kongresa Komitato por la 95-a Kongreso de SAT, kune kun la Plenum-komitato de SAT, konstatas, ke pro la morala kaj praktika maleblo okazigi kongreson de SAT en militanta lando, la kongreso ĉi-jare ne povos okazi ĉeeste.
Ni kondamnas la teruran agreson de la nuntempa registaro en Rusio kontraŭ la ukraina popolo. Ni subtenas la kontraŭmilitan movadon en Rusio, kaj esperantistojn, laboristojn, studentojn kaj popolojn en la mondo, kiuj helpas civilulojn en Ukrainio. Diplomatio tutmonde devas agadi por ĉesigi la militon kaj ne akceligi konfliktojn. Ne - al milito! Jes - al paco!

Dum la sekva periodo ni provos trakti diversajn manierojn krei alternativojn al la ĉeesta kongreso planita por Moskvo. Ni esperas okazigi aranĝojn, verŝajne virtualajn, kiuj ebligos esperantistojn interkompreniĝi kaj diskuti pri diversaj pacmovadoj, sociaj reagoj kontraŭ milito k.s. Ankaŭ ni provas serĉi manieron okazigi kongreson iamaniere, eĉ se virtualan, kaj intencas fokusigi ĝin pri pacmovadoj.
Ni bonvenigas proponojn de SAT-membroj kaj aliaj esperantistoj pri tiaj temoj.

**Plenumkomitato – Sennacieca Asocio Tutmonda**
**Organiza Kongresa Komitato – 95-a Kongreso de SAT**



Kijivo, preĝejo de St.Andreo (konstr.1749-1754)
La arkitekto B.Rastrelli

### DEKLARACIO DE LA ESTRARO DE INTERNACIA JURISTA ESPERANTO-ASOCIO OKAZE DE LA AGRESO DE RUSIO KONTRAŬ UKRAINIO

Depost la jaro 1945 la internacia komunumo havigis al si, pere de Unuiĝintaj Nacioj, taŭgan instrumenton por disvolvi inter la nacioj amikajn rilatojn bazitajn sur la respekto de la principo de egaleco de la rajtoj de la popoloj kaj de ilia rajto disponi pri si mem, kaj fari ĉiajn aliajn disponojn taŭgajn por solidigi la pacon de la mondo, laŭ la artikolo 1-a de la Ĉarto subskribita en la urbo San-Francisko en tiu jaro.

Same, la artikolo 2.1 de la Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj proklamas, ke la membroj detenas sin, en siaj internaciaj rilatoj, je minaco aŭ uzo de forto, ĉu kontraŭ la teritoria integreco aŭ politika sendependeco de ia ajn ŝtato, ĉu en ia alia maniero malkongrua kun la celoj de la Unuiĝintaj Nacioj. Pro tio, agres-milito ne povas esti akceptata en nia mondo, des pli se oni scias, ke ekzistas nukleaj armiloj kapablaj detrui kelkfoje la tutan homaron.

Pro ĉi ĉio, IJEA, kiu proklamas en sia celaro strebi al justeco, laŭleĝeco, efektivigo de la homaj rajtoj kaj la demokratio en la mondo, rifuzas kaj kondamnas la ĵusan agreson realigitan de Rusio kontraŭ Ukrainio, ĉar ĉi tiu agado tute ne kongruas kun la principoj de Unuiĝintaj Nacioj, internacia asocio kie Rusio ĉefrolas, sed hodiaŭ ĝi ŝajnas forgesi ilin.

IJEA alvokas por tuja paco en Ukrainio, por ke ukrainoj, rusoj kaj

ĉiuj najbaraj popoloj povu vivi en paca etoso. Nia asocio ankaŭ solidarecas kun ĉiuj viktimoj, speciale kun la plej etaj kiuj vidas, ke normala vivo en familio kaj lernejoj haltas kaj, por savi siajn vivojn, ili devis ekigi malfacilan vojon por atingi rifuĝon en najbaraj landoj – senfinan dankemon al tiuj ŝtatoj kiuj bonvenigas kaj akceptas ilin.

IJEA, kompreneble, ne prenas politikajn poziciojn, tamen hodiaŭ ne temas pri politika disputo, sed pri milit-agreso tute kontraŭa al la Internacia Juro kaj al la paca kaj kunlaborema spirito, kiu devas regi la internaciajn rilatojn.

Laste, IJEA alvokas al ĉiuj instancoj, speciale al la Konsilio pri Sekureco de Unuiĝintaj Nacioj, ĉesigi la militon; al najbaraj landoj akcepti ĉiujn rifuĝintojn kiuj devis foriri el sia lando por savi siajn vivojn; kaj al la Prokurorejo de la Internacia Puna Kortumo por pristudi la terurajn okazintaĵojn kiuj povus esti plenumitaj dum ĉi tiu militagreso, kaj la respondecon de la agresantoj.

**La Estraro de Internacia Jurista Esperanto-Asocio**
Lisbono, la 28-an de februaro 2022.

## Tre rimarkinda estas Deklaro de 5 famaj rusiaj esperantistoj

En ĉi tiu teruriga tempo ni, nunaj kaj eksaj aktivuloj de E-movado en Rusio kaj estraranoj de la Rusia Esperantista Unio, sendas nian plej sinceran kunsenton kaj plej bonajn dezirojn al la ukrainiaj samideanoj.

La agreso de la rusia registaro estas nepermesebla kaj ne ĉiuj esperantistoj el Rusio subtenas ĝin.

Ni esperas, ke plejmulto de tiuj estas kontraŭ la milito, malgraŭ unuopaj eldiroj favore al ĝi.

Ni esperas, ke la milito plej baldaŭ finiĝos.

Ni esperas, ke Ukrainio, ties loĝantaro kaj interalie geesperantistoj postvivos ĝin. Ni esperas, ke ukrainiaj esperantistoj ankaŭ estonte havos bonajn rilatojn kun rusiaj samideanoj*.

Milito ne estas solvo. Milito estas kontraŭhoma. Milito estas kontraŭ la ideo de Esperanto kaj esperantismo!

**Grigorii Arosev** eksPrezidanto de REU
**Aleksandr Blinov** eksa ĝenerala sekretario de TEJO kaj eksa estrarano de REU

**Irina Gonĉarova** estrarano de REU,
prezidanto de la E-Asocio MASI
**Nikolao Gudskov** eksPrezidanto de REU
**Georgij Kokolija** eksPrezidanto de REU

NDLR *Por nomiĝi samideano, ne sufiĉas posedi Esperanton!

Sed por veraj esperantistoj kaj normalaj homoj estas ŝokiga pozicio de REU-prezidanto A.Lebedev:

## Distanciĝo de la antaŭnelonga deklaro de kelkaj personoj pri la eventoj en Ukrainio.

La 27an de februaro 2022 en «Libera folio» aperis notico sub la titolo «Rusiaj esperantistoj kontraŭ la milito», kiu enhavis deklaron pri la ukrainiaj eventoj. La deklaron subskribis kvin personoj: G. Arosev, A. Blinov, I. Gonĉarova, N. Gudskov, G. Kokolija. <...> Venas maltrankvilaj demandoj de kelkaj homoj pri rilato de REU al tio. Responde al tiuj demandoj, mi atentigas:

1)Rusia Esperantista Unio havas neniun rilaton al tiu deklaro. La deklaro estis verkita kaj subskribita de privatuloj, kiuj elpaŝas en sia propra nomo, sed ne en la nomo de REU kaj des pli ne en la nomo de la tuta esperantistaro rusia.

**2**) Oficiala pozicio de REU pri tiom sentebla afero povus aperi nur kiel decido de la Estraro, kio ne okazis, kaj espereble ne okazos.

3) La opinioj pri la ukrainiaj eventoj estas ekstreme kontraŭaj en la socio. Oficiala subteno de unu el la pozicioj signifus fortan neglekton de granda parto de nia membraro, kiu havas la malan pozicion.

Ekzemple, persone **mi kiel privata persono plene kaj senkondiĉe subtenas la specialan operacion de la rusia armeo, kiu okazas nun en Ukrainio.**

Se la Estraro oficiale deklarus ion kontraŭ ĝi — mi demisius kaj komencus batali por nuligo de tia deklaro fare de nia supera organo (Konferenco de REU). Do, **la plej adekvata pozicio de REU kiel organizaĵo rilate al la temo — simple diri nenion pri ĝi.**

Aleksandr Lebedev, prezidanto de REU

NDLR. *Per dikaj literoj mi markis liniojn, kiuj bone montras personecajn kvalitojn de tiu ulo (mi ne povas nomi lin "homo", des pli "samideano").*

**Jen estas preskaŭ tuja reago de Universitato A.Mickiewicz (Poznano, Pollando) en kies Interlingvistika Studo estis studinta la "ĉefesperantisto" de REU.**

## Likvido de Ukrainio ne bonvenas en Pollando!

Universitato Adam Mickiewicz nuligis la studrajton de la prezidanto de Rusia Esperanto-Unio pro liaj deklaroj subtenantaj la invadon de Rusujo kontraŭ Ukrainujo. La decido okazis post du leteroj al la universitato: unu sendita de la prezidanto de Bjalistoka Esperanto-Societo, kaj dua de instruistoj, kunstudantoj kaj diplomitoj de la programo Interlingvistikaj Studoj.


La blogo de la Interlingvistikaj Studoj de Universitato Adam Mickiewicz raportas, ke Aleksandr Lebedev estas forigita el la listo de studentoj de UAM la 8-an de aprilo. La blogaĵo, publikigita de profesoro Ilona Koutny, gvidanto de la programo, aludas al letero sendita al la rektoro de UAM. Ne estas menciita alia letero, kiu jam iom pli frue atingis la universitaton. Sekve de vidpunktoj de Aleksandr Lebedev, prezidanto de Rusia Esperanto-Unio, publikigitaj en *Libera Folio* la 5-an de aprilo, **ke la milito lanĉita de Rusujo finiĝu ne per paca interkonsento, sed "ideale … per la kompleta likvido de la nuna ukrainia ŝtato",** kelkaj liaj kunstudantoj ĉe la Universitato Adam Mickiewicz rapidis aranĝi kunvenon por urĝe interkonsenti pri reago.
Partoprenis la samtagan retan kunsidon dek kunstudantoj de Aleksandr Lebedev, plus Ilona Koutny, fondinto-gvidanto de la postdiplomaj Interlingvistikaj Studoj en Poznano, kaj Katalin Kováts, kiu instruas en la programo…

*NDLR. Tekstoj de la Deklaroj kaj la bildoj estas prenitaj de "Libera Folio"… Dankon, Kalle!*

***INTERESA FAKTO.* Ekde komenco de la milito kvanto da homoj, kiuj studas la ukrainan en Duolingo kreskis je 577% en la tuta mondo. Lideras Usono…**



## Hibrida kunveno pri Lidja Zamenhof en Tel-Avivo (aperis en la revuo “Esperanto).




En 1942 estis murdita en la mortigkoncentrejo Treblinka Lidja Zamenhof. Por omaĝi la 80-jaran datrevenon en 2022 UEA okazigas di-versajn agadojn omaĝe al la "filino de Esperanto". Al tiu evento estis dediĉita la unua hibrida Israela Virtuala E-Kunveno (IVEK) en 2022, kiun partoprenis ĉ. 30 s-anoj per Zoom kaj ankoraŭ ĉ. 10 fizike, en la nova sidejo de ELI, en Alon-turo, Tel-Avivo. Specialaj gastoj estis Margaret Zaleski-Zamenhof, Duncan Charters, la prezidanto de UEA, Joni Mizraĥi, profesoro pri antropologio kiu verkis premiitan novelon pri Lidja, kaj Itamar Ben-Jehuda kaj Arnon Goldfinger, reĝisoro kiu planas fari dokumentan filmon pri Esperanto.

Malfermis la kunvenon Duncan Charters, kiu rakontis pri sia rilato al la personeco de Lidja. Prof. Mizraĥi prezentis (angle) sian interesiĝon kaj esploron pri Zamenhof kaj Ben Jehuda, kaj komparis la du lingvokreantojn, samgentaj, samepokaj kaj eĉ samnomaj, Eliezer (Lazaro) Zamenhof kaj Eliezer Ben-Jehuda, renoviganto de la hebrea lingvo. E-traduko de lia novelo troviĝas en Israela E-isto 164-165 p.21-33. Margaret Zaleski-Zamenhof emocie rakontis pri sia praonklino Lidja, kiu instruis Esperanton al ŝia patro Luis Zaleski-Zamenhof (la Nepo). Pluraj el la partoprenantoj demandis al Margaret pri diversaj temoj ligitaj al Lidja kaj al ŝi persone, kaj ŝi pacience kaj kortuŝe respondis.

Sekve Amri prezentis la atestofoliojn pri la morto de Lidja en la datumbazo de Yad Vashem. Aldone al la konata folio, de la atestanto Eva Heller-Torn, Israelo (aldona foto), plenigita mane en 2005 far Josi Ŝemer, estas en la datumbazo ankoraŭ du diĝitaj atestofo-lioj por Lidia, pli malfruaj: de Bernhard Westerhof (Germanio, sekretario de Bahaa E-Ligo) kaj de Jan Snoek (Nederlando). Interese, la tri folioj mencias diferencajn datojn por la morto de Lidia. En la unua temas pri septembro 1942, en la dua – julio 1942 (ver-ŝajne temas pri eraro, ĉar ĝi asertas ke la forportado de Varsovio al Treblinka okazis en septembro) kaj la tria – oktobro. Jehoŝua Tilleman aldonis plurajn detalojn pri la sorto de la familio Zamenhof en la Holokaŭsto.
Registraĵo de la kunveno estas videbla en la jutuba kanalo de ELI.
Post la kunveno okazis prezentado de la nova estraro de ELI, elektita en la Zamenhofa Vespero. Al la ok antaŭaj estraranoj, aliĝis du novaj, junaj: Ŝaj Mor, dumviva membro de UEA (kaj ELI), kiu respondecos pri Vikipedio, kaj Inbar Mor (malgraŭ la sama nomo ili ne estas parencoj), kiu respondecos pri junularaj aferoj. La unua decido de la nova estraro estis modifi la kunveno-planon: fizikaj (hibridaj) kunvenoj okazos unu fojon monate, kutime en la unua lundo de la monato, en la nova sidejo de ELI en Alon-turo. Dum la ceteraj semajnoj okazos plene virtualaj kunvenoj per Zoom. Bonvenon al niaj kunvenoj!

N-ro 172 aŭtuno 2021 ISSN-1565 3315
ISRAELA ESPERANTISTO

*Reeĥo de Bardhyl Selimi el Tirana (Albanio):* ...min ĵus atingis IsEs-172. Estas kiel ĉiam eta revuo, sed ege riĉa je seriozaj akademiaj artikoloj, amuzaĵoj agrablaj, scivolemaĵoj, vivopriskriboj, raportoj, fotaĵoj. Gratulojn!
Enviindas popolo tiu israela!
Dio protektu ĝin!



## *MIRINDA DANIO*

*Jen, por via atento estas interesa artikolo, kiu traktas tre aktualan kaj akre disputatan temon nuntempe en la mondo. La redakcio ne volas esprimi ian ajn opinion, sed pensas, ke estas grave ke la legantoj ekkonu diversajn vidpunktojn pri tiu tutmonda problemo.*
*Gabi Zeevi – membro de la redakta komitato.*

Eble neniu lando en Eŭropo vokas tian admiron kiel Danio. Malgranda skandinavia lando kun ne tre riĉaj geografiaj rezervoj de la ekonomio, povis atingi mirindajn sukcesojn. La parto de industrio en Interna Ĝenerala Produktado (IĜP) estas pli ol 40%. Preskaŭ 60% (!) de ĝia industria produktado estas eksportata. Danio estas unu el la mondaj lideroj en la uzo de renovigeblaj energifontoj. Danio havas konstantan grandan pluson en la komerca bilanco. La lando estas la unua en la mondo laŭ ekstera komerca spezo por unu enloĝanto.




La sukcesojn de Danio eblas listigi sufiĉe longe kaj ĉiuj ili iel resumiĝas al la fakto, ke Danio superas la plej multajn EU-landojn laŭ novigo, la uzo de altteknologia, kompleksa kaj altteknologia inĝenierado, tre produktiva agrikultura sektoro pri viando, lakto ktp. Ĉio ĉi signifas, ke la dana socio havas pli altan intelektan kaj socian kapitalon ol la EU-landoj.

Kiel ili atingis ĉi tion? Kio estas la kialo? La kialo de tiuj vere elstaraj sukcesoj kuŝas en la dana elito, kiu ĉiam distingiĝis per alta politika respondeco, sendependa konduto kaj saĝa strategia pensado. La danoj ne karakteriziĝas per grega instinkto, kiel en kelkaj EU-landoj, ili havas tre evoluintan komunan saĝon kaj la kapablon objektive akcepti faktojn, estas preskaŭ neeble ŝpini ilin en ian ideologian eŭropan aĉaĵon malprofite de iliaj naciaj interesoj. La danoj bone konscias pri la danĝero de tro intima integriĝo en EU, kaj neniam suferis pro eŭro-eŭforio. Tial Danio saĝe ne aliĝis al la eŭrozono, rifuzis eŭropan civitanecon kaj partoprenon en la komuna sekureca sistemo. Ĝenerale ĝi evitas ĉiajn integrigajn asociojn. Interesa estas la konduto de la dana politika elito dum la migrada krizo, kiu kaptis EU-n.

Responde al la alvoko de “avinjo” Merkel larĝe malfermi la pordojn por la rifuĝintoj, la danoj montris per fingro ĉe la tempio kaj... tuj severigis la enmigrajn leĝojn, kiuj draste reduktis la eniron de enmigrintoj en la landon. Malgraŭ severaj kritikoj de EU kaj de aktivuloj pri homaj rajtoj, Danio retiriĝis eĉ ne unu paŝon, sed, male, enkondukis eĉ pli altajn barojn por rifuĝintoj, reduktante ilian fluon al minimumo. Sed tio eĉ ne estas mirinda. La rimedoj, kiujn Danio prenis en la lastaj monatoj rilate al la migrantoj, estas okulfrapaj. Ili estas vere revoluciaj por EU kaj estas alia ekzemplo de la sendependeco de la konduto de la dana elito kaj ĝiaj strategiaj aliroj al la sistemaj problemoj.
La Dana Parlamento (Folketinget) simple kaj senambigue perceptis la realaĵojn kaj kuraĝe nomis fosilon - fosilo. Nome, ke:
- alvenantaj migrantoj el islamaj landoj, ne integriĝas en la danan kulturon;
- enmigrintaj islamanoj loĝas kompakte, ne laboras, ne studas danan lingvon kaj kulturon;
- en la lando formiĝas paralela socio, malsama ol la dana, kaj tio prezentas danĝeron por Danio;
- en la lando formiĝis islamaj getoj, vivantaj de sociaj subvencioj, kie floras krimo kaj drogoj.
La Dana Parlamento honeste fiksis la problemon, kaj tute “politike malkorekte”, ne laŭ eŭropa maniero, solvas ĝin. Ĝi estis bazita sur la principo de malaprobado de libervola integriĝo, kaj eblos anstataŭigi ĝin per deviga asimilado kaj pliseverigo de punoj por la faritaj krimoj. Estas akceptita stoko da leĝoj, konsistanta el 20 leĝoj kaj estis direktita decidece forigi la formiĝintajn getojn. La leĝoj estas direktitaj al:
- leĝe difini la koncepton de "geto" kaj atribui al ĉi tiu kategorio 25 lokojn de kompakta loĝado de islamaj enmigrintoj;
- homoj loĝantaj en la geto estis klasifikitaj kiel speciala kategorio de civitanoj. Loĝantoj de geto estas submetitaj al duoblaj punoj pro la faritaj krimoj;
- infanoj naskitaj en la geto, ekde la aĝo de 1 jaro, estos perforte (!!!) forigitaj el siaj familioj dum almenaŭ 25 horoj semajne (sen kalkuli dormotempon), por esti enmergiĝintaj en la "danajn valorojn". En kazo de rifuzo, tia familio estas senigita de ĉiuj sociaj subvencioj de

la ŝtato, eĉ se la familio ne havas ajnajn fontojn de enspezo.
Malpermeso estas enkondukita pri translokigo de infanoj por longaj periodoj al islamaj landoj, por ke infanoj ne revenu denove al la islamaj valoroj de la patrujo de siaj gepatroj, ktp. ktp.
Kurte dirante, kruda deviga asimilado kaj longaj prizontempoj pro ajna krimo. La prizono, ja, ankaŭ bone asimiligas! Konforme al la ellaborita strategio, ĝis 2030 devus ekzisti eĉ ne unu geto en Danio kaj ĉiuj islamanoj devus esti integritaj kaj asimilitaj, la malobeantoj la leĝojn kaj ordojn devus esti prizonitaj. Kaj ial mi ne dubas, ke tiel tio estos farita - decideme kaj konsekvence, strikte laŭplane. Ĉar Danio estas tre serioza lando.
Kaj kio pri Eŭropo kun sia malpermeso de truda asimilado, kun sia principo de multkultureco, la sankta homa rajto je ilia nacia identeco ktp.? Kial ĝi silentas? Kial aktivuloj pri homaj rajtoj silentas kaj ne akuzas Danion pri la genocido?
Tial ili silentas, ĉar ĉi tio estas Danio, sed ne iu Pollando aŭ Hungario, kiujn oni miksus kun fatraso, se ili decidus pri la samo. Oni scias, ke ĉiuj bestoj en EU estas egalaj, sed kelkaj estas iom pli egalaj.

*Traduko de M.Lineckij*

## POŜTMARKA MILITO




La 24.02.22 enkadre de rusia invado en Ukrainion garnizono de ukrainiaj limgardistoj, lokigita sur la insulo Zmijinij ("Serpenta") estis atakita de rusiaj militŝipoj. Al propono de kapitano de la krozŝipo N 121 "Moskvo": "Mi estas rusia militŝipo kaj mi proponas ne rezisti, kaj kapitulaci", al kio unu el la limgardistoj, Romano Gribov, donis emocian respondon: (iom blasfeme) "Rusia militŝipo, iru vi al kaco!" Tiu slogan-frazo tuj famiĝis kaj rapide disvastiĝis en Ukrainio, kaj eksterlande (mi aŭdis ĝin en Haifo, Israelo).
Ukrainia Ĉefa Poŝtoficejo anoncis konkurson pri desegnaĵo por la poŝtmarko pri tiu temo, al kiu reeĥis ĉ. 500 pentristoj. Gajnis la desegnaĵo de la pentristo Boris Groĥ. Jam estas venditaj pli ol mil ekz. Estas planate emisio de ankoraŭ kelkaj serioj de ĉi-temaj poŝtmarkoj. Por la filatelistoj tiuj poŝtmarkoj tuj fariĝis granda deziraĵo...




# ISRAELA KONGRESO-22 EN 2022

per okuloj de israelano

Amri WANDEL

La 15-an de aprilo finiĝis la naŭ-taga programo de la 22-a Israela Kongreso (7-9.04) kaj ĝia postkongresa ekskurso (10-15.04). En la kongreso partoprenis fizike ĉ 20 personoj, el ili 7 eksterlandanoj, kaj virtuale ĉ. dek. Matene okazis ekskursoj, posttagmeze prelegoj kaj vespere artaj programoj. Pluraj programeroj estis registritaj kaj videblas en la jutuba kanalo de ELI.



Ĵaŭde (7.04) virtuale prezentis la unuan programeron Mikaelo Bronŝtejn kaj Dina Rubina (unu el la plej renomaj israelaj verkistinoj en la rusa lingvo) - pri ŝia libro "La blanka kolombo de Kordovo", kiu aperis an-kaŭ en E-o (tradukis Mikaelo, aĉeteblas ĉe ELI kun aŭtografoj de la ver-kistino kaj tradukisto). Sekvis laborgrupo pri eŭritmio de Tali Wandel, kiu en la vespera programo prezentis kun la kolegino eŭritmian dancon. Sekve kantis Inbar kaj Enrica kaj poste okazis koncertoj de Sergeo Straŝnenko kaj de Georgo Handzlik. Vendrede matene okazis ekskurso al la historia Tel-Avivo, kaj posttagmeze salutis virtuale Duncan Charters, prezidanto de UEA, Mikaelo Bronŝtejn prelegis virtuale pri judaj bardoj en la Dua Mondmilito kaj okazis la 85-a AMO-seminario pri scienca agado - kun 3 prelegoj pri ISAE (Stefan MacGill, virtuale), spacteleskopoj (Amri) kaj la Internacia Kongresa Universitato kaj Akademio Internacia de la Sciecoj (Amri, sabate). Vespere okazis koncerto de ukrainaj kantoj far Mikaelo Lineckij kaj Sergeo Straŝnenko kaj premiero de la nova kabaredo "Verda Banano" de Saŝa Pilipović kaj Georgo Handzlik.



Sergeo Straŝnenko




Sabate estis ekskurso tra malnova Jafo kaj postagmeze - koncerto de ciganaj kantoj (Saŝa Pilipović) kaj ferma forumo.

Fotoj de la Kongreso videblas en Facebook de Yael kaj Amri.



En la postkongresa ekskurso (10-15.04) partoprenis ĉiuj sep eksterlandaj gastoj, ĉiĉeronis en Esperanto Amri. Komence oni pasigis du tagojn en Jerusalemo, Jeriko, Ein Gedi kaj la Morta Maro, sekvis Masado kaj Eilat (Ruĝa Maro), poste




du tagojn en Jordanio (Petra kaj Wadi Rum) kaj laste la kratero Ramon en suda Israelo.

Sekvas raporto pri la kongreso kaj postkongreso (verkis Georgo Handzlik) kiu aperos en la maja n-ro de Revuo Esperanto.

## ISRAELA KONGRESO-22 EN 2022

per okuloj de polo (aperis en la revuo "Esperanto).

Georgo HANDZLIK



La inviton partopreni la 22-an Israelan Kongreson de Esperanto en Tel-Avivo mi ricevis antaŭ preskaŭ tri jaroj. Antaŭ la pandemio. Poste Amri Wandel, la organizanto de la aranĝo, kelkfoje informis, ke li devas prokrastigi la kongreson je kelkaj monatoj kaj fin-fine li okazigis ĝin en aprilo 2022. La plej gravaj signoj, kiuj videblis en la programo, estis provo eliri el la pandemia tempo kaj organizi ne virtualan kongreson. Tio realiĝis parte. Pluraj lokaj kaj eksterlandaj esperantistoj, kiuj aliĝis antaŭe, rezignis ĉefe pro la koronviruso. En la saloneto de la kongreso aperadis ĝis dudek realaj samideanoj kaj ĝis dek virtualaj, ĉar grandparto de la kongreso estis spektebla en interreto. Pri la programo vi


povas konsulti la paĝon *https://www.esperanto.org.il/ ik.html*.
Se vi scivolemas pli detale, mi notu, ke ĉiuj programeroj okazis, kaj la homoj ĝenerale ŝatis ilin. La hotelo, kie ni loĝis, havis „sabatan lifton", kiu haltis sur ĉiu etaĝo, sen tuŝo de ajna butono, ke piaj judoj povu plene ripozi dum la sankta sabato. Kaj ili ripozis tutfamilie. Sabate ni kongresumis en unu salono kaj ili preĝis en la apuda. Unuj al la aliaj rigardis kun intereso.
La unua programero jam estis granda surprizo, laŭ plana renkontiĝo kun Dina Rubina, fama rus-israela verkistino, kaj Mikaelo Bronstejn, kiu tradukis en Esperanton ŝian ĵuseldonitan romanon "*La blanka kolombino de Kordovo"*. La romano vendiĝis nur en la rusa lingvo preskaŭ trimilione. Kaj kiam la pandemio ŝajne mildiĝas, venis novaj problemoj. Pro la situacio en Ukrainio la flugo de Mikaelo estis „simple" nuligita kaj li ne povis veni. Du tagojn antaŭ la planita prezentado de la libro la aŭtorino malsaniĝis kaj asertis ke ŝi ne povas veni al la kongresejo, malgraŭ, ke ŝi loĝas de multaj jaroj en Israelo. Krianta truo en la programo!!! Ne, ne nepre. Por la inaŭguro de la kongreso aperis ili ambaŭ... sur ekrano. Dina el sia hejmo parolis tre interese pri la libro kaj verkista laboro, Mikaelo el Rusio ŝin interpretis kaj apendice rakontis pri sekretoj de la traduko. Ekzemple, ĉu vi scias la Esperantan nomon de araneaĵformaj rompetoj de la farbo sur malnovaj bildoj? Ne? Ankaŭ li ne sciis. Pri la trovita, laŭ zamenhofa solvo vi povas ĝui en la libro. Sergeo Straŝnenko kantis kantojn de Mikaelo Bronŝtejn kaj kun Mikaelo Lineckij popolajn ukrainajn kantojn. Saŝa Pilipović prezentis ciganajn kantojn en traduko de Bronŝtejn. Tiel la ĉefa heroo de la arta programo estis la neveninta Mikaelo. Nur mi kantis miajn kantojn sen ajna rilato al li.

Dum la pandemio Teatro "Verda Banano" de Saša Pilipović kaj Georgo Handzlik ne prezentis sin publike, tamen preparis tute novan, kabaredan programon "Mi diros al vi sekrete". Ne estas facile skribi komediajn tekstojn por esperantistoj, ĉar ĉiu samideano havas malsamajn fonajn sciojn, ridas pri malsamaj aferoj. Do por la programo ni preparis tiajn pecojn, kiuj aŭ estas ride universalaj aŭ rilatas al komunaj travivaĵoj de esperantistoj. Ĉiu premiero estas granda malcerto, kiel akceptos ĝin la publiko. Ĉi-foje la diversnaciaj spektantoj ridis sufiĉe multe. Sed mi devas konfesi, ke ankaŭ

ni en du lokoj rakontis pri... Mikaelo Bronŝtejn.
Jam la unuan tagon la vivo memorigis nin, al kiu lando ni venis. En la centro de Tel-Avivo teroristo mortigis homojn en trinkejo. La sekvan tagon ni eksciis, ke la polico mortpafis la teroriston kelkcent-metrojn de nia hotelo.
Mi tre ŝatis ekskursojn gviditajn de Amri Wandel laŭ Tel-Avivaj itineroj de gravaj lokoj de la nova kaj malnova Israelo.
Post la fino de la kongreso ni, la eksterlandanoj, okpersone iris malkovri la kongreslandon kaj apudan Jordanion. Ĉe la landlimo israela oficistino demandis min (kial ĝuste min?) kiu estas la lingvo de nia grupo? Mi rapide respondis, ke Esperanto. Post ioma serĉado ŝia poŝtelefono sonigis en Esperanto klarigan komunikon kiel procedi ĉe la landlimo. Jordania multjara kunlaboranto de israelaj post-kongresaj ekskursoj salutis nin en Esperanto. En pluraj lokoj ni fotis nin kun verda flago, kio vekis kelkajn varbajn konversaciojn. Ni vidis Petra-n, mirindan ŝtonan urbon, anoncitan unu el la sep novaj mirakloj de la mondo. Same grandan impreson faris por mi dezerta ĵip-safario en la ruĝkolora dun- kaj rok-rezervejo Wadi Rum. Kion mi antaŭe sciis pri dezertoj?!
Laciga vojaĝo, tamen pura poezio, mielo, olivoj kaj dolĉa vino. Ĉiuj belaĵoj de Jerusalemo. Mi sciis pri israelaj kibucoj el malnovaj priaj filmoj. Ho ve al mi! Mi sciis nenion. Ni loĝis en neimageble pura, fajna kaj agrabla kibuca hotelo. Jes, mi legis pri oazoj, tamen tiu, kie ni estis, aspektis ekster miaj imagoj. En la biblia urbo Jeriko ni vidis ĵusrekonstruitan mozaikon el la oka jarcento, la plej grandan en la Mezoriento, kaj naĝis en la apuda Morta Maro. Ĉu vi scias, ke ekzistas du Mortaj Maroj? Ankaŭ mi ne sciis. Eble indos venontjare pripensi viziton al Israelo. **Dankon pro la invito!**


Kunmanĝa kunsido

## LA FORPASOJ
## Anatolo Gonĉarov (08.09.1940-11.02.2022)



La 11-an de februaro 2022 en Brjansko pro la koronviruso COVIM-19 forpasis Anatolo Gonĉarov, unu el la plej aktivaj gvidantoj de la sovetia kaj rusia Esperanto-movado dum pluraj jardekoj, honora membro de TEJO.

Li naskiĝis en Siberio, studis en Odeso. Ĝuste en Odeso aŭtune de 1958 li konatiĝis kun Esperanto.

Lia juna ardo imponis al malnovaj esperantistoj kaj eĉ oficialuloj, kaj li sukcesis trafi al la oficiala grupo de sovetiaj esperantistoj, kiuj vizitis en 1964 la Universalan Kongreson en Hago, kie li konatiĝis kun Humphrey Tonkin, tiama prezidanto de TEJO. Li sugestis al Anatolo, ke indas fari la landan junularan organizon, rezulte post jaro naskiĝis SEJM – Sovetia Esperanta Junulara Movado.

Memoro pri Anatolo Gonĉarov ĉiam restos en animoj de multaj esperantistoj de Rusio, de aliaj landoj de la eksa Sovetio kaj de la tuta mondo.

*Nikolao Gudskov*

## Simo Milojeviĉ, vera viro forpasis



Malaperis lastatempe Simo Milojeviĉ, unu el la kolonoj de la Esperanto-movado en la dua duono de la 20-a jarcento. Pluraj revuoj jam donis la kernajn datojn pri li (naskiĝo: 1936, lernado de Esperanto: 1956, morto: 2022), kaj en pluraj lokoj geamikoj de li priskribis lian karieron en Esperantujo, de instruisto pri Esperanto en Hindujo ĝis ĝenerala direktoro de UEA tra redaktado de Kontakto kaj de la revuo Esperanto de UEA. Sed mi volas tuj doni reliefe personan juĝon: Simo estis vera viro, en la senco, pri kiu parolas/-is sudeŭropaj viroj, kiuj ne estis/estas ankoraŭ haltigitaj de la tiel nomata "politika ĝusteco". Simo estis vera viro, ĉar li preferis agi kaj ne paroli pri agoj farotaj de aliaj. Simo estis vera viro, ĉar decidinte esti esperantisto, li restis tia dum la tuta vivo, kaj por li esti esperantisto

signifis 'disvastigi Esperanton por plibonigi la mondon'. Tion li pruvis dum sia restado en Hindujo kaj Nepalo, en siaj artikoloj en Kontakto, kiuj tute nature respegulis la sentojn de la generacio de Tyreso, se tiu nomo ankoraŭ diras ion al la nunaj junaj esperantistoj, en la temaro de la revuo Esperanto, kiam li redaktis ĝin.

Mi aldonu ankoraŭ ion. Simo estis bona homo, li estis kiel la bona onklo, kiun ĉiuj el ni havas, kiu ne riproĉas siajn genevojn, ne kulpigas ilin pro iliaj eraroj, sed provas defendi ilin antaŭ la rigoraj gepatroj. Unuvorte, li estis la amiko, kiun ĉiu volus havi. Kaj tio klarigas, kial neniu kritika voĉo nun leviĝas post lia morto. Neniu ricevis maljustan traktadon de Simo en la jaroj en kiu, kiel ĝenerala direktoro de UEA, li havis grandan liberecon mem fari decid-ojn pri movadaj aferoj.

Fine, Simo apartenis al la antaŭreta generacio, al tiu generacio, kiu esperantistiĝis en loka klubo, komencis havi funkciojn en la loka klubo, kaj de tio moviĝis al landa laboro kaj post jaroj al internacia laboro. Do, temis pri homoj kun vasta sperto pri la pluraj funkcimanieroj de ĉiuj tavoloj de la Esperanto-mondo. Tiuj spertoj nun iĝas maloftaj kaj tio klarigas, kial malmulto funkcias ekster la kvazaŭa (= virtuala, en moderna Esperanto) vivo.

*Renato Corsetti*

## FOTOJ DE 22-a ISRAELA ESPERANTO-KONGRESO



↑ Serba-pola kvarteto kun israela biero.

Ekskurso tra malnova Jafo →






*Ajnaj situacioj povas naski ŝercojn… Ankaŭ ĉi milito kreas atmosferon, kiam naskiĝas diversspecaj humuraĵoj… Vidu mem…*

* Ukrainianoj estas trafitaj de nova viruso. Ĝiaj ecoj: unueciĝo, honoro, kredo, kuraĝo kaj amo al sia patrujo. La malsano ne estas kuracebla. Vastiĝas rapide, sed nur inter la ukrainianoj. Vakcino kontraŭ ĝi ne ekzistas!

*NDLR. Klarigo: pro tio, ke Ukrainio estas multnacieca lando, estas eraro nomi popolon de ĝi - ukrainoj. Ukrainoj estas ĉefa kaj plej nombra parto de la loĝantaro.*

* Popolo de Ukrainio tre similas al abeloj. Ili paceme flugas super siaj floroj, gaje zumas kaj kolektas nektaron. Sed oni ne allasu eĉ penson ŝovi manojn en ties abelujon kaj des pli - forpreni ilian mielon…

* Venis foje estro de la agres-lando al sorĉistino kaj demandis ŝin:
- Kio okazos al mi en proksima tempo?
Ŝi dismetis la kartojn, fermas la okulojn, enpensiĝis kaj respondas:
- Mi vidas vin veturanta en granda luksa aŭto. Ĝin ĉirkaŭas amaso da feliĉaj homoj. Ili ĝojas, ridas, interbrakumas, dancas, kantas…
- Kaj ĉu mi salutas ilin per la mano?
- Ne, la ĉerko estas fermita…

*Armeo № 2 en la mondo (Rusio) petis helpon de armeo № 3 (Ĉinio) por militi kontraŭ armeo №22 - (Ukrainio).

* Rifuĝinton el Ukrainio en Israelon oni demandas en la flughaveno:
- Ĉu vi estas judo laŭ panjo aŭ laŭ paĉjo?
- Ne, laŭ la Prezidento…

*- Ĉu vi scipovas la anglan?
- Jes, certe…
- Diru al mi, kion signifas "Welcome"?
- Bonvolu - "Ĉeporda tapiŝeto"…



# SENTENCO PRI BONA INSTRUISTO

Foje junulo rekonis preterpasanton kiel sian instruiston el elementa lernejo. Li aliris la maljunulon kaj demandis:



- Ĉu vi memoras min? Mi estis via lernanto.
- Jes, mi memoras vin kiel 10-jarulon. Pri kio vi nun okupiĝas?
- Mi instruistas.
- Kio estis kaŭzo por tiu elekto?
- Ne "kio", sed "kiu" ... Vi!
- Kiumaniere mi inspiris vin al nia profesio?
- Ĉar vi tiel impresis min, ke ankaŭ mi ekvolis havi junajn lernantojn.
- Permesu scivoli, ĝuste kio estis mia influo?
- Ĉu vere vi ne memoras? Permesu al mi freŝigi vian memoron. Foje mia samklasano venis en la lernejon kun bela horloĝo sur la brako, kiun donacis al li la gepatroj. Li demetis ĝin kaj ŝovis en la tablokeston. Mi ĉiam revis havi tian horloĝon. Mi ne povis reteni min, kaj decidis preni ĝin el lia lernotablo. Baldaŭ tiu knabo venis al vi kun larmoj en la okuloj kaj plendis pri la ŝtelo. Vi rigardis al ĉiuj ni kaj diris:
- Tiu, kiu prenis la horloĝon de tiu knabo, bonvolu redoni ĝin.
- Mi ege hontis, sed mi tiel volis lasi ĝin ĉe mi, ke mi ne konfesis...

Vi iris al la pordo, ŝlosis ĝin kaj ordonis, ke ni ĉiuj viciĝu ĉe la muro, avertinte, ke li kontrolos ĉiuj niajn poŝojn, sed ni ĉiuj devos stari kun fermitaj okuloj. Ni obeis kaj mi sentis, ke tiu estis la plej hontinda momento en mia nelonga vivo.

Vi iris de unu lernanto al la alia, de poŝo al la poŝo. Kiam vi elprenis la horloĝon el mia poŝo, vi iris plu, ĝis fino de la vico. Poste vi diris: "Knaboj, ĉio bonordas, vi povas reveni al viaj lokoj". Vi donis la horloĝon al la posedanto kaj eĉ ne unu vorton vi diris pri la incidento.

Tiumaniere tiun tagon vi savis mian honeston kaj mian animon. Vi ne montris min kiel ŝteliston, mensogulon kaj malindan infanon. Vi eĉ ne unu vorton diris al mi pri tiu okazaĵo. Post paso de ioma tempo mi tion komprenis. Ĉar vi, kiel vera pedagogo, ne volis kompromiti la junan, ankoraŭ ne plene formiĝintan knabon. Tial mi fariĝis pedagogo.

Ni ambaŭ silentis sub influo de la rakontita historio. Poste la juna

pedagogo demandis:
- Se vi min hodiaŭ ekkonis, ĉu ne revenis al vi rememoro pri tiu epizodo?
La maljuna instruisto respondis:
- Vidu, kontrolante viajn poŝojn ankaŭ mi fermis la okulojn...

*Prenita de Interreto, tradukita de M.Lineckij*

**SAĜA PROFESORO**



Foje profesoro donacis al ĉiu studento po unu balono, petis ilin blovi kaj skribi sian nomon sur ĝin. Poste la profesoro ĵetis la balonojn en la koridoron, kie ili miksiĝis. La studentoj ricevis 5 minutojn por trovi balonon kun sia nomo. Malgraŭ streĉa serĉado, preskaŭ neniu trovis la sian. Tiam la profesoro proponis al la studentoj preni ajnan balonon kaj transdoni ĝin al tiu, kies nomo estis skribita sur ĝi. Post 5 minutoj ĉiu havis sian balonon. La profesoro diris al la studentoj:
- Ĉi tiuj balonoj estas kiel feliĉo. Ni neniam trovos ĝin, se ĉiu serĉos nur la propran. Sed, se ni zorgus pri feliĉo de iu alia... ni trovas ankaŭ la nian. Ni ja ĉiuj estas interkonektitaj!

***

* La sama boteleto da akvo en supervendejo kostas 20 cendojn, en sporta salono – 50 cendojn, en trinkejo – 1 eŭron kaj en aviadilo – 3 eŭrojn. Ĉio dependas de loko, kie oni bezonas ĝin.
Do, kiam al vi ŝajnas, ke vi neniom valoras kaj por nenio taŭgas, sekve vi estas ne en ĝusta loko.

*- Sarah, kara, ĉu la dialogo ankoraŭ estas ebla, aŭ vi jam definitive estas prava?

*- Karulo, ĉu vi iam vidis ĉifonitajn 50 000 siklojn?
- Ne...
- Do, rigardu, - diris ŝi, malfermante la garaĝon...

## ŜERCO PRI DU ALMOZULOJ

Sur iu el stratoj de Romo sidas apude du almozuloj. Unu el ili tenas en la mano katolikan krucon, kaj la dua - sespintan judan stelon de Davido. Homoj, preterirantaj homon kun la kruco, poste rimarkas homon kun la stelo, revenas kaj ĵetas monon en ĉapelon de la unua. Iu el la pasantoj haltis kaj vidis, ke multaj homoj donis monon al la kruchavanto, kaj preteriris tiun kun la stelo de Davido, kaj diris al li:

- Kion vi faras ĉi tie? Ĉu vi tute nenion komprenas? Romo ja estas la ĉefurbo de katolikismo. La homoj ne volas doni al vi la monon, ĉar en via mano estas judeca signo, des pli, ke apud vi sidas malriĉulo-kristano. Eĉ pli - al li la homoj donas la monon ofte pro la maliceco rilate al vi.

La almozulo kun la stelo atente aŭskultis la homon, ridetis kaj diris al la apudulo:

- Hej, Joĉjo, vi rimarkis, kiel tiu sinjoro provas instrui marketingon al mem fratoj Bronŝtejn!

## KONVERSACIO KUN RABENO

- Diru al mi, sinjoro rabeno, ĉu mi rajtas rigardi al junulino, kiu estas vestita en minijupon aŭ bluzeton kun profunda dekoltaĵo?

- Jes, rajtas.

- Kaj se ŝi sur plaĝo sunbruniĝas vestita en mini naĝkostumon?

- Jes, rajtas.

- Kaj se ŝi estas tute nuda, ĉu ankaŭ tio ne estas malpermesata?

- Jes, eblas.

- Kaj ĉu ekzistas iu objekto, al kiu por judoj nedezirindas rigardi?

- Jes, estas.

- Kiu?

- Mi konsilus ne rigardi al procedo de elektroveldado...

## TELEFONVOKO AL UKRAINIO:

- Moĉjo, kio ĉe vi tie okazas?

- Ĉi tie Rusio iomete militias kontraŭ NATO kaj spertas grandegajn perdojn...

- Kaj NATO?

- Vi tuj laŭte ridos - NATO ankoraŭ ne alvenis...


# POSTKONGRESAJ EKSKURSOJ


Petra, ĝenerala pejzaĝo


Ein Gedi - akvofalo David


Eilat - ĉe la subakva muzeo


Ruĝaj dunoj en Wadi Rum


Petra - la Trezorejo


Kun nia gastiganto en Wadi Rum